# Muzika sidado - Grupa interkoniga ludo

Tiu ludo funkcias kun partoprenantoj de ĉiuj lingvo-niveloj. Ĝi estas variaĵo de ludo, kiun oni nomas en Usono "Muzikaj Seĝoj.
Nia ludo havas du gravajn avantaĝojn por interkonaj celoj: ĉiuj restas en la ludo ĝis la fino, kaj la ludantoj kunlaboras anstataŭ konkurenci. La ludo povas esti iom vigla, kun iom da interhoma kontakto. Do, juĝu ĉu ĝi taŭgas por la homoj en via grupo. Tamen, ne supozu ke ĝi funkcias nur kun junuloj. Eble ĉar ludantoj agas tute ekster la sociaj normoj de ĉiuj kulturoj, plej diversaj homoj pretas provi kaj ĝui ĝin.

**Necesas** seĝo por ĉiu ludanto kaj muzikilo (aŭ kantema gvidanto).
**Aranĝu** la homojn en maldensa cirklo de seĝoj. Klarigu al la ludantoj, ke kiam vi aŭdigos la muzikon, ili ekmarŝu en cirklo (interne de la cirklo de seĝoj). Kiam vi haltigos la muzikon, ĉiuj rapide trovu seĝon, kaj sidu per ŝerce formala pozo. La persono kiu laste sukcesos sidi, kaj digne silenti, devas prezenti sin: "*Mi nomiĝas Derek*." La kutima honto esti "la LASTA" tiel fariĝas ia honoro, ĉar nur tiu persono prezentas sin. Poste, vi re-aŭdigas la muzikon, kaj la ludo ripetiĝas.

Tio rapide fariĝus teda, se vi ne ŝanĝus ion.
Do, **ekde la dua fojo**, dum la muziko sonas, komencu <u>puŝi iujn seĝojn al novaj pozicioj</u>, tiel ke la seĝa cirklo fariĝas iom serpentuma kaj ĥaosa. Pro tio, trovi seĝon kiam la muziko haltos ne estos tute facile kaj regule. Tamen, tio ne sufiĉos por longe reteni la intereson. Juĝu laŭ la energio de la grupo, kaj **post tri aŭ kvar fojojn**, kiam ĉiuj komprenas la bazan formon, anoncu ke en la sekva ciklo, <u>vi forprenos seĝon</u>.

Tamen, tio NE signifas ke iu ne sidos. Male, la LASTA persono devos sidi sur iun, kiu jam trovis seĝon. (Interesa elekto... sur kiun mi eksidu?) Emfazu ke ili estu ĝentilaj. (Kompreneble, oni ne suferigu la kunseĝulon. Restigu la piedojn sur la planko, kaj klinsidu, anstataŭ meti la tutan pezon sur la alian personon. Kutime, mi montras ĉion-ĉi al la grupo, antaŭ ol ili faras).
La LASTA persono (por kiu ne resti propra seĝo) petu permeson antaŭ ol sidi sur iun: "*Ĉu mi rajtas*?"
Al la peto, la sidanto respondu, "*jes,*" "*ne*," aŭ "*ni interŝanĝu*."

- Je <u>jesa</u> respondo, la LASTA eksidas kaj sin prezentas.
- Post respondo "<u>ne</u>," la LASTA petos al alia persono, ĝis iu akceptos.
- Al respondo "<u>ni interŝanĝu</u>," la sidanto ekstaras, la LASTA eksidas sur la seĝon, kaj la sidinto eksidas sur la LASTAn. Tiu prezentas sin, kaj poste aldonas prezenton de la kunulo: "*Mi estas Derek, kaj mi sidas sur Marta*."

Denove aŭdigu la muzikon, deprenu plian seĝon, kaj movu kelkajn aliajn. Je la fino de la muziko, ĉi-foje du homoj devas sidi sur iun. Kutime, vi havos du parojn, sed se ili deziras, ili rajtas sidi tri sur unu seĝo. Nun pli da homoj prezentiĝas: "*Mi estas Lana, kaj mi sidas sur Adriana*." Kaj de alia seĝo, "*Mi estas Viktor, kaj mi sidas sur Johano.*"
Ripetu.

Ekde tiu fazo, malofte la ludantoj enuiĝas. Ludu ĝis minimume, ĉiu sidas sur aŭ sub iu. En granda grupo, deprenu pli ol unu seĝon dum ĉiu ciklo. Kiam pli ol du sidas sur unu seĝo, la prezentoj estu en tia formo:

"*Mi nomiĝas Klara, kaj mi sidas sur Steĉjo*."
«*Mi estas Steĉjo, kaj mi sidas sur Martina*."
"Mi estas Martina, kaj mi sidas sur Karlo."
"*Mi estas Karlo, kaj vi tri estas pezaj*." Ktp.

Do, ĉiu persono prezentas sin, kaj unu alian personon en la staplo. Post nelonge, ĉiuj prezentiĝos plurfoje.

Daŭrigu laŭ via takso de la etoso. Kun malgranda grupo, eble vi ludos ĝis restas nur unu seĝo. Kun granda grupo, vi eble haltos kiam pluraj seĝoj restas (ĉiu kun aro de sidantoj).
Mi ŝatas **fini la ludon en kompleta cirklo**. Mi petas ĉiujn stari kun mi en cirklo, kiel ni komencis la ludon, pretaj por ekmarŝi. Poste, mi petas ĉiujn, "Metu la du manojn sur la ŝultrojn de la persono antaŭ vi." Sekve, mi petas ke la homoj proksimiĝu kaj la cirklo malgrandiĝu, ĝis la distanco inter ĉies brusto kaj la dorso antaŭ ili estas ĉ.20 cm (manoj restas sur la ŝultroj).

"Nun," mi diras, "Ĉiuj, tre malrapide, zorge kaj atente, eksidu sur la personon, kiu estas malantaŭ vi." Post kiam ni atingas komfortan cirklan sursidadon, mi sugestas ke delikata masaĝado de la ŝultroj eble plaĉus al via antaŭulo, "Demandu kaj faru, se vi interkonsentas." Dum la masaĝado, mi komencas sinprezentadon, kiu daŭras tra la tuta cirklo: "Mi estas Derek, kaj mi sidas sur Johano." "Mi estas Johano, kaj mi sidas sur Katarina." Ktp, ktp, ĝis ĉiuj prezentis sin kaj sian "seĝulon."

Mi finas per ia ĉarme-stulta diraĵo, kia :
**Tia estas Esperanto, ĉu ne? Ĉiuj subtenas la aliajn**.

Mi direktas ĉiujn zorge restariĝi, kaj la ludo finiĝas.
***************************

**Notoj**:

- Foje, du aŭ tri homoj ne deziros ludi. Kutime, mi petas ilin helpi al mi per funkciigo de la muzikilo, depreno kaj rearanĝo de la seĝoj. Ofte, post kiam ili observas kelkajn ciklojn, forvelkas la hezitemo, kaj ili pretas partopreni. Avantaĝo de tiu ludo estas ke iuj povas eniri (aŭ eliri) la ludon meze, sen ĝeni la ludadon.
- La persona, ofte eĉ korpa kontakto eble ne plaĉas al ĉiu, tio povas dependi de kulturoj kaj aĝo. Bv. konsideri kaj respekti tiun faktoron.
- Estu atenta al la grupo kaj individuoj, kaj intervenu kiam necesas por glatigi ĉion.